

Михаил Лермонтов,
La anĝelo

tradukita de Boris Mirski

Kun kanto solena en nokta ĉiel'
Sin portis mirinda anĝel';
Kaj luno, kaj steloj, kaj nuboj en rond'
Atentis la himnon de l' mond'.

Li kantis pri vivo sen zorga ĉagren'
Sub branĉoj de pura Eden';
Kaj laŭd' al keruboj, al granda Sinjor'
Elflugis sincere el kor'.

En brakoj animon li portis al ter',
Al mond' de malĝojo, mizer';
Kaj restis la kanto en juna anim'
Sen vorto, sen unu esprim'.

Kaj plena je stranga, mirinda dezir'
Ĝi vagis en mond' de sopir',
Kaj tedis al ĝi post la kant' de l' eter'
La veaj motivoj de l' ter'.

*Traduko de la Rusa poemo "Ангел" de МИХАИЛ
ЛЕРМОНТОВ (*1814-10-15 – †1841-07-27) en Es-
peranton de Boris Mirski.*

Arg-1039-2113 (2014-06-03 11:55:42)

*Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas en [http://
donh.best.vwh.net/Esperanto/iteraturo/
Poezio/lermontov/angxelo.html](http://donh.best.vwh.net/Esperanto/iteraturo/Poezio/lermontov/angxelo.html).*

Михаил Лермонтов,
Ангел

По небу полуночи ангел летел,
И тихую песню он пел,
И месяц, и звезды, и тучи толпой
Внимали той песне святой.

Он пел о блаженстве безгрешных духов
Под кущами райских садов,
О Боге великом он пел, и хвала
Его непритворна была.

Он душу младую в объятиях нес
Для мира печали и слез;
И звук его песни в душе молодой
Остался - без слов, но живой.

И долго на свете томилась она,
Желанием чудным полна,
И звуков небес заменить не могли
Ей скучные песни земли.

*Verkinto de tiu ĉi Rusa poemo estas МИХАИЛ
ЛЕРМОНТОВ (*1814-10-15 – †1841-07-27).*

Arg-1039-2110 (2014-06-03 12:23:12)

*Pri la poeto Lermontov vidu la retejon [http://eo.
wikipedia.org/wiki/Михаил_Лермонтов](http://eo.wikipedia.org/wiki/Михаил_Лермонтов).*